

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN -PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelijks
Achtthende jaargang
Nummer 7-8 (200)
JULI-AUG. 1951


Vertegenwoordiger in Nederland:
LEEN
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P. M. Mablesone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
België: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 fr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

ANTVERPENNO, URBO DE NIA KONGRESO



Antverpeno, gildodomoj kaj fontano „Brabo“ (Antverpena prop. servo)

La denaska artemo de la flandra popolo kaj precipe de la Antverpenanoj estas monde konata. Tion atestas ja la artotrezoroj de Gento, Bruĝo, Bruselo, Antverpeno kaj aliaj malnovaj flandraj urboj.

Antverpeno estis la centro de glora pentra skolo, la naskiĝejo de artistoj, el kiuj pluraj brilis inter la plej famaj en la tuta mondo.

Precipe en la 16-a jarcento, kiam pro la komerclo la Antverpenanoj iĝis proverbe riĉaj, la logika sekvo estis, ke ĉiaj artoj floris.

Jam en 1352 estis farataj la fundamentoj de la nuntempa belega „katedralo“ (ĉefpreĝejo). Du turoj devis leviĝi sed nur unu estas finkonstruita. Du jarcentojn oni laboris pri tiu gotik-stila preĝejo. Ĝiaj arĥitektoj estis grandaj artistoj. La unuaj nomigis Johano kaj Petro Appelmans. Ĉe la piedo de la katedralo oni admiru monumenton je la honoro de la aŭdacaj „turkonstruantoj“. La dua desegno la planon de la turoj kaj konstruis ilin ĝis la unua galerio. Post lia morto sekvis Johano Tack, Everard kaj tri membroj el la fama familio de Waghmakere. En 1521 imperiestro Karolo V metis la unuan ŝtonon de grandega altarejo, sed granda incendio detruis parton de la konstruaĵo en 1533 kaj pene oni daŭrigis la laboron. La 123 m. alta turo entenas belegan sonorilaron. La plej peza sonorilo pezas 8000 kg kaj estas nomata „Carolus“ laŭ sia baptopatro Karolo V. La internajo estas impreso grandioza: sep navoj; ĉefverkoj de Rubens: la „Krucstarigo“ kaj la „Depreno de la Kruco“; ankaŭ „la Cieliro de la sankta virgolino“ de la sama majstro. Herman II (de Waghmakere) faris ankaŭ la planojn de la rimarkinda S-ta Gomaropreĝejo en la proksima Lier kaj

de la antverpena S-ta Jakobopreĝejo. Tiu ĉi lasta estas vera muzeo kaj entenas pentraĵojn de la plej famaj pentristoj. En ĝi estas la tombo de Rubens. Herman ankoraŭ konstruis la „Halo(n) de la Buĉistoj“, gotikan domon apude de Skeldo, nun vizitinda muzeo de artindustriaj. Dominiko estis i.a. arĥitekto de la „Steen“ (kastelo ĉe l'Skeldobordo, nun muzeo enhavanta ampleksan kolekton da interesaj antikvaĵoj) kaj de la malnova Borso, kaj komencis la konstruadon de la S-ta Paŭlopreĝejo (kiu enhavas belajn pentraĵojn de Van Dyck, Jordaens k.a.). Vidinda estas la kalvario flanke de la konstruaĵo.

Kiam la Renesanco forigis la nacian gotikan stilon, la flandra arĥitekturo sukcesis doni al ĝi originalan karakteron. La ĉefo de la nova skolo estis Kornelo Floris (de Vriendt). Li stariĝis la urbodomon (1561-1565) laŭ la stilo de la frua Renesanco. La internajo estos vizitata de la kongresanoj. Johano Floris estis fama ceramikisto, kiu Filipo II venigis al Hispanujo.

Inter la antverpenaj majstroj de la fino de la 16-a jarcento ni nomu ankoraŭ Henriko de Pas, Paas aŭ Paeschen, kiu konstruis laŭ postulo de Sir Thomas Gresham, angla bankiero, la Borson en Londono laŭ modelo de la antverpena. Tiu borso forbrulis en 1666 kaj estis rekonstruita de alia antverpenano J. B. Hendrickx.

Multaj domegoj kaj „hoteloj“ el tiu tempo bedaŭrinde malaperis, sed ni vidu nur la Gildodomojn sur la Granda Placo kun skulptaĵoj kaj reliefaĵoj, kaj aliajn ĉi tie kaj tie dissematajn domojn en la malnova urbo, por ekhavi impresan ideon pri la riĉa aspekto de la 16-jarcenta Antverpeno.

En 1382 la ĉiuspecaj artistoj kunigis en Gildo „Sankta Luko“. Flanke de ili Antverpeno ankaŭ nombris poetojn, kiuj havas honorindan lokon en la malnova flandra, ja nederlanda literaturo: Jan van Boendale, urba sekretario (1280-1365); dum la reformacio la militanta instruistino katolika Anna Byns kaj en la 17a jc. la teatraĵisto Willem Ogier (lia bruststatuo troviĝas ĉe Skeldo) la populara monaĥo Poirters kaj Junkro Van der Noot, unu el la unuaj renesancaj poetoj.

La literaturistoj tiamaj estis kunigitaj en t.n. „Retorikaj Ĉambroj“. La anoj sin ekzercis en la teatroludo, la deklamado kaj versfarado. La triumftagoj de tiuj „ĉambroj“ estis la teatraj konkursoj aŭ „Landjuveloj“ (juvelo estis la premio). Plej fama estis tiu de la jaro 1561 en Antverpeno. Dekkvar ĉambroj veturis al nia urbo el Sud-kaj Nordnederlando. Pli ol 1400 kavaliroj riĉkoloro vestitaj, 22 triumfĉaroj kaj 196 aliaj ornamitaj ĉaroj partoprenis. La sekvantaro kiu eliris estis ege luksa kaj logis la koron de la Antverpenano, kiu eĉ nuntempe ankoraŭ estas specialisto en la organizo de brilaj sekvantaroj.

Post la dekadenco de Bruĝo, Antver-

ĈU ESPERANTO TAŬGAS POR LITERATURO?

L. DE BEAUFRONT

(fino)

Ne el unu vorto, el unu esprimo kaj eĉ el unu izolita fragmento, sed el la tuto ni devas juĝi la kapablecon literaturan de ia lingvo. Pli, ni agos prudente, se ni malfidos al la malveraj taksoj, kiujn povas inspiri al ni la patraj lingvoj. Kiom da aferoj ni trovas belaj en ili, eĉ belegaj, kiuj tamen estas nur monstroj, se oni ekzamenas ilin laŭ la kriterio de la saĝo! Kaj tiel potence estas la forteco de l'kutimo, ke ni fine trovas en nia lingvo, energiaj kaj delikataj vortoj aŭ arangoj, kiuj estas iafaje pure sensencaj. Tiujn ĉi belajn Esperanto certe ne donos al ni. Sed ni ne opinias, ke ili formas en la lingvoj la kvaliton literaturan, alie ĉiun frazon, en kiu la ideo estus klare kaj logike esprimita, oni devus konsideri kiel malsuperan aŭ mankan, kaj neniam ni povus admiri en lingvo tion, kio dekliniĝus vorte, esprime aŭ arange de la aferoj trovataj en la nia. Alivorte kaj por resumi mian penson, kun tia fundamento de juĝo, ia lingvo estus literatura nur, se ĝi donus al ni la fidelan imiton de l'nia.

Ekster la pensoj, kiuj dependas de la verkanto aŭ de la parolanto, la tuta potenco literatura de la lingvo troviĝas en la elementoj, kiujn ĝi uzas kaj en ilia arangado. Nu vere, ĉu la elementoj de Esperanto ne estas la elementoj mem de niaj lingvoj, kaj ĝuste tiuj kiuj plej internaciigis ĉe la popoloj regantaj la civilizacion? Ĉu ili ŝansas sian naturon kaj fariĝas malpli literaturaj en Esperanto ol en niaj lingvoj?

Sed, oni diras, la konstanta kutimo de l'esprimo ĝusta, ĉefega leĝo en Esperanto, devos senigi la parolon je ĉiu koloro, je ĉiu vivo; ĝi devos doni al la lingvo sensignifan fizionomion, ne havantan propran karakteron aŭ esprimmecon.

Nenie mi legis ke la neĝusteco de l' termino estas kondiĉo absoluta de koloro kaj de vivo por la stilo. Oni eĉ instruas nin laŭ kontraŭa principo; kaj aliparte ĉu la prudento ne diras al ni, ke esprimo nefiksa, neĝusta aŭ malvera devas malutili al tio speciale. Kaj se la fizionomio de la lingvo perdas sian propran karakteron, forlasante la idiotismon kaj uzante la gustan vorton, se per la fakto ĝi fariĝas sensignifa

peno heredis ĝian riĉecon. Pli ol mil fremdaj komercistoj, francoj, danoj, italoj, germanoj, hispanoj, portugaloj kaj orientanoj konstante loĝis en la urbo. Antverpeno estis vera mondrobo. La riĉeguloj el tiu jarcento en Antverpeno - inter ili ni nomu Fugger, posedanto, de fabelaj havaĵoj-pruntedonis milionojn al Karolo V, Henriko VIII kaj Eduardo VI:

Anstataŭ Bruĝo, sama

Eŭropa komercurb'.

Kondukis ĝi sen kurb',

Patrujon supren al reputacio fama.

De l'abundeco la akir'

La „Landjuvelo“ kaj turnir'

Atestis ĝian brilon. Burĝoj ja sen ĝeno
Invitis monŝuldantajn reĝojn al festeno,
Kaj kiel rekompenc' por tiu la honor'
La ŝuldateston nenigis je pulvor'!

(Ledeganck: Aan Antwerpen)

Pli ol 90.000 ŝipoj ĉiuspecaj enveturis Skeldon jare, alportantaj laŭtakse 4.000.000 t. da komercaĵoj. Oni tie ĉi faris pli da komercaĵoj aferoj en unu monato ol en Venecio en unu jaro, kiel skribis al la respubliko iu el ĝiaj senditoj.

Tial ne mirigas ke en Antverpeno vivis multe da mecenatoj. De 1453 ĝis 1490 la Gildo enskribis 212 novajn membrojn inter kiuj 150 pentristojn 30 gravuristojn kaj 50 arĥitektojn. Skulptitaj kaj pentritaj altartabloj estis eksportataj eĉ ĝis la skandinavaĵ landoj kaj Hispanujo.

(finota)

kaj komuna, ni devos konfesi, ke la lingvo franca ĉesas esti franca kaj ne havas plu ian ĉarmon literaturan, kiam ĝi anstataŭas la idiotismon aŭ la nefiksajn vortojn per esprimo logika, preciza kaj klara por ĉiuj, kio fariĝas konstante. La koloro kaj la energio de l' stilo ne rifuĝis en la idiotismojn, kaj malpli ankoraŭ en la vortojn neprecizajn; tiu peco, kiu enhavas nenun idiotismon, povas esti senlime pli viva ol alia, en kiu ili ekzistas multege, kaj la propra fizionomio, la genio speciala de lingvo ne dependas de ili. Sed Esperanto estas la lingvo de l'esprimo preciza, ĝi estas ankaŭ la sola idiomo, kiu akceptas ordonojn nur de la logiko. La esprimado de l'pensoj ne estas en ĝi konstante ĝenata, kiel en niaj lingvoj, de vortordo nefleksebla aŭ stranga kaj de la kapricoj de l'kutimo. Komparo, imaga, hiperbolo, metaforo, arango originala, vortordo saĝe libera estas rajte allasataj en ĝi, kiam ili estas klaraj kaj veraj. En tiaj kondiĉoj, ĉu Esperanto povas ne esti literatura?


Sed ni rememorigu pri tio, kion ni diris jam en 1898, en la fino de niaj artikoloj pri la idiotismoj; tio ĉi valoros pli ol ĉiuj rezonoj, ĉar ĝi estas la pruvo per la faktoj.

La multaj tradukoj kaj la verkoj originalaj, produktitaj de Esperanto, pruvus evidente, ke la idiotismoj de niaj lingvoj - kaj tio ĉi estas la granda kontraŭparolo en la rilato literatura - povas esti tradukataj sub forma komprenebla por ĉiuj, neniel malgrandigante la fortecon kaj la belecon de l'pensoj.

En „Iliado“ de Homero, en „Hamleto“ de Shakespeare, en „Kaino“ de Byron, en „Demonio“ kaj „Princino Mary“ de Lermontov, en „Boris Godunov“ kaj „La Neĝa Blovado“ de Puŝkin, en „Fantomoj“ de Korolenko, en „Renskita Manfred“ de K.R., en „La Gefratoj“ de Goethe, en „Edziĝo de Figaro“ de Beaumarchais, en la „Literaturisto kaj lia Fianĉino“ de Flygare-Carlen, ĉe „En le Brikejo“ de Wasniewski k.t.p., ni prezentas al la mondo tiel grandan kolekton da idiotismoj grekaj, anglaj, rusaj, germanaj, francaj, svedaj kaj polaj tiamaniere tradukitaj en Esperanto, ke la plej obstina el la skeptikuloj devas konfesi, ke li estas venkita.

Tio ĉi okazis al profesoro de la angla lingvo inter niaj konatoj. Li juĝis, ke la lingvo internacia estas nebla. Kiam ni devigis lin konstati ĝian ekziston, li ne povis plu nei, sed li rifuĝis en la pretenditan malkapablon de lingvo arta por esprimi la nuancojn de la pensoj. Lia plej forta kontraŭparolo estis la idiotismoj. Neniam, pensis li, Esperanto povos traduki kontentige ĉefan verkon de niaj literaturoj. Li eklernis Esperanton kaj komencis la legadon de l'traduko de Hamleto, farita en tiun lingvon de doktoro Zamenhof mem. Lia sola celo, li sincere ĝin konfesis, estis povi pruvi al ni, kun dokumentoj en la mano, ke li estas milfoje prava. Li legis la tekston anglan, ĝin konstante komparis kun la esperanta traduko, tre certa ke li trovos ĝin en manko sur preskaŭ ĉiu paŝo. Tial granda estis lia surprizo, kiam li devis konstati ke ĝi, ne kontenta esti fidela, proprigis al si nekredible la koloron kaj la vivon de l'teksto originala. En tiu fojo li ne dubis plu; li ne parolis plu pri la idiotismoj nek pri la malkapableco de Esperanto por traduki la ĉefajn verkojn literaturajn. Tiam, kun spirito tute alia, li faris novan eksperimenton. Li prenis diferencajn tradukojn de l'dramo Shakespeare'a kaj komparis ilin kun tiu de Esperanto. Post detala ekzameno, lia konkludo estis, ke la traduko esperanta estas en alta grado la plej bona. La dubantoj agu sammaniere; kaj ili vidos ankaŭ, ke Esperanto ludas sian rolon almenaŭ tiel bone kiel niaj lingvoj en la kampo literatura. Ĝi tien alportas, kiel ĉiu el ili, sian noton specialan, sian propran genion. Kaj ĉu alie

(Fino de la artikolo troviĝas sur paĝo 2-a en la 4-a kolono sub rubriko „Wereldnieuws“.)



Antverpeno, katedralo kaj turo (Antverpena prop. servo)

OBSERVOJ

PRETER ESPERANTO.



Mia artikoleto „Kompatingoj kobajoj!“, kiu aperis en mia marta numero, vekis pli ol centlinian refutprovon de la koncarnato, kie evidente defendas la tezon: Esperanto estu la sola lingvo.

Apoge de tiu herezo li citas Lanti, la spiritan patron de la „sennaciismo“, kun kiu korespondi - kaj malkonsenti - mi siatempe havis la honoron.

Anstataŭ komenci polemikon kun mia okaza korespondanto, mi konsilas al li atente legi la verkojn de D-ro Manders. Mi ja ne dubas, ke post kompleta informigo li forlasos la vojon kiu kondukas preter Esperanto, ĉar „la Esperantismo estas penado disvastiĝi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu, ne enrudante sin en la internan vivon de la popoloj, kaj neniam celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si“.

Pik.

VEELTALIGHEID

Een jonge hond,
nog pas zijn moeders nest ontropen
En dus niet half genoeg volleerd
In 't blaffen,
zoals elk dit van een hond begeert,
Had de onbezonnen lust bekropen,
Om 't witgewolde lam,
De rappe geit, de ruige ram
Zo na te blaten,
dat men warelijk moest zweren,
Dat men dier beesten taal
niet zuiverder kon leren.
Dit was de hond nog niet genoeg.

Hij oefent zich verder in het nabootsen van het geluid van ten minste nog een half dozijn andere dieren en wil dan met zijn veelzijdige kunst voor zijn medehonden komen pronken. Maar hij oogst een averechts succes en wordt uitgelachen in plaats van toegejuicht, vooral als hij op verzoek van het publiek zich ook eens in 't verzuimde „moederlijk geblijf“ wil laten horen. Dat gaat hem maar jammerlijk af en, niet-tegenstaande alle moeite die hij zich later getroost heeft, is hij

... al zijn leven
Een slechte kramtong
in zijn moedertaal gebleven.

DE LES

die de dichter hiermee voor meer dan honderd jaar aan zijn taalgenoten wou geven was duidelijk genoeg, en geldt nog steeds tot op onze dagen:

O Nederlanders,
doet toch niet als deze hond!
Bouwt op de kennis
van uw eigen taal de grond
Van vreemde talen.

Het bovenstaande vonden we in het Maartnummer van „Nu Nog“, tijdschrift ter bevordering van het algemeen beschaafd in Zuid-Nederland, waarin J. Leenen een noodkreet slaakt omdat de kennis van de eigen taal door de studie van te veel vreemde talen in het gedrang komt. Hopelijk grijpt men in de uiterste nood naar de redding: Esperanto, de tweede taal voor ieder.

Wij begrijpen dat het niet in de lijn ligt van voornoemd blad om propagandate te voeren voor Esperanto. Toch is o.i. het algemeen beschaafd slechts een schakel in de ketting: gewestsspraak-algemeen beschaafd-Esperanto. Het eerste voor het gebruik in engere kring, het tweede voor het gebruik op nationaal plan, en het derde voor het gebruik op internationaal gebied. Het ei van Columbus van een probleem dat steeds dringender een oplossing vereist.

Jeugdherberggids 1951, eld. Vlaamse Jeugdherbergcentrale, Antwerpen.

La ĝeneralaĵ informoj aperas en ĝi en la franca, angla, germana kaj ankaŭ en Esperanto, miascie unufoje. Ni trovas plu liston de la flandraj, valonaj, luksemburgaj kaj nederlandaj junulargastejoj kun sciigoj pri alilandaj J. G.-organizoj. Tre utilas modeloj de migroj tra Flandrujo kun krome modela bicikla veturo tra la Beneluxlandoj, pri kiuj estas cetere aldonita mapo koncerne la J. G.

Kiel kutime la formato estas praktika, la preso kaj papera taŭgega!

La eldonejo estas nepre gratulinda pro la verko kaj la enmeto de la Esperanta teksto, kiu helpas tiujn kiujn ja ne konas la „internaciajn“ menciitajn lingvojn!

Okazos internacia junulara esp-ista kampado 4-11/8 en la bieno de la Ruĝa Kruco en Villers-la-Ville (Belgiujo). Informojn donas s-ro M. Jaumotte, 44 de Bruynlaan, Wilrijk, Antwerpen.

LA STUDANTO

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer:

1. Sidante en la kupeo mi rigardis al la preterflugantaj pejzaĝoj kaj al la herbejoj, sur kiuj staris bovinoj, dezirantaj esti melkataj.

2. Guste kiam mi estis razonta min, oni sonorigis, do mi kun duone sapumita vizago rapidis al la jus kolorigita pordo, tra kies rompiĝinta vitreto mi vidis la sonoriginton.

3. Per miaj pro la frosto rigidigintaj fingroj mi ne sukcesis levi la salintan argentumitan medalon.

4. En la festotago promenante tra la urbo, mi vidis multajn fremdulojn, venintajn ĉi tien por admirari la bele ornamitajn fasadojn de la fortike konstruitaj domoj.

5. La knabeto estis ploranta, ĉar lia pilko estis krevinta, sed la lin konsolanta patrino iris kun li al nova antaŭ du tagoj malfermita butikoj por aĉeti por la plorinta, siajn larmojn jam sekiganta (sekiginta) knabeto novan pilkon.

Senpluva vetero; li dormis tro longe; ĝisosta esperantisto; li havas malbonan memorkapablon; tio superas miajn atendojn!; li venis piede; ĝis la tria leciono inkluzive; ĉiu parolis pri tio; li laboras kiel du; post longa pripensado; detranĉitaj floroj; tio ne malutilos!; pluvus torento (pluvegas).

Vul in: per, por, pri of pro:

1. Li mortis — nesingardemo; lia frato mortis — la patrujo. 2. Ili havis nenion — fari; — tio ili parolis — ovoj kaj bovoj — pasigi la tempon. 3. Li finis sian paroladon — adiaŭaj vortoj kaj salutinte nin — la mano li foriris — ĉiam. 4. La profesoro — matematiko kaj la kuracisto — virinoj dankis min — belaj paroloj — mia helpo. 5. Li tremis — la tuta korpo — la malvarmo. 6. Oni estas malavara — havo najbara. 7. Se vi parolos eĉ — unu vorto — tio, vi staros — unu piedo en la tomo! 8. Ili estas parencoj — Adamo. 9. Kvankam en ĉi tiu butikoj tiu drapo kosta po dudek frankoj — metro, li pagis en alia butikoj nur kvindek frankojn — trimetra peco. 10. Li diris al mi, ke li venis — serioza afero, nome — solvi la problemon — lingvo internacia. 11. Konscia — la fakto ke li pravis, li — la pugno batis la tablon — ke liaj kontraŭuloj konvinkigis — la gusteco de lia teorio. 12. Ĉiuj prepozicioj — si mem postulas la nominativon.

NURA KAJ SOLA

La adverbo sole estas malofte uzata; preskaŭ ĉiufoje oni uzas kiel tradukon de *slechts, alleen* maar la samsignifan adverbos nur, ekz. la originalaĵo *perdis, ekzistas nur kopioj de ĝi; ne nur... sed ankaŭ... Esperanto estas nur*

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ.

	Gld.	Belg. Fr.
Kredu min, sinjorino!, de C. Rossetti (bind.)	5,40	73,—
Miru-Pensu-Ridu, de P. Bennemann (bind.) (neelĉerpebla kolekto da artikoloj, enigmoj, serĉoj, k.t.p. por la konversaciaj vesperoj)	5,40	73,—
Fundamenta Krestomatio, de L. Zamenhof	5,20	72,—
Fundamenta Krestomatio, de Zamenhof: kelkaj uzitaj sed bonaspektaj ekzempleroj (bind.)	3,95	—
La mondo ne havas atendejon, de M. Dekker	2,50	34,—
Invito al ĉielo, de D. Sayers, orig. romano duontole bindita. Malaltigita prezo	3,50	46,—
La 13-a mortis, de L. Vetter, kriminala romano trad. duontole bindita	4,70	62,—
Fundamento de Esperanto Ned.-Esp.	-,90	10,—
Fundamento de Esperanto Esp.	-,65	8,—
Kon-Tiki, de Th. Heyerdahl, rakonto pri vojaĝo de 6 viroj dum 101 tagoj sur 14-metra floto, trad., 200 paĝ., 60 fotoj, tola bindo	14,50	165,—
Kiso de la reĝino, de J. F. Najvin, distra kaj amuza legajo pri aventuroj kun la indiĝenoj kaj sovaĝaj bestoj en la Belga Kongo, trad.	2,35	27,—
Hamleto, de Shakespeare; trad. L. Zamenhof	1,50	20,—
Fabeloj III, de Andersen, trad. L. Zamenhof	2,30	—
Marta, de E. Orzesko, trad. L. Zamenhof, uzitaj sed bonaspektaj ekzempleroj	2,—	27,—
10 leterpapejoj kun kovertoj kun surskribo: „Esperanto, lingvo internacia“	0,50	—
Kongresparoladoj de L. Zamenhof, kun resumo pri la historio de Esperanto	0,45	—
Emajlitaj pordoŝildoj kun verda stelo kaj surskribo: „Esperanto parolata“	0,75	—
diversaj glumarkoj (rondaj, kvadrataj, steloj) 100 ekz.	0,50	6,—

MENU ĈE

Boekendienst L.E.E.N., Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, (giro 76915)
Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenberge steenweg 72, Brugge (p.c.r. 3268.51)

Een wilde staking; bij meerderheid van stemmen; wonder boven wonder; ieder vogeltje zingt zoals het gebekt is; het hemd is nader dan de rok; voor dag en dauw; tot over de oren in de schuld zitten; dat gaat mijn verstand te boven!; een kellner wenken; een Citroen uitpersen; verbouwing; argwaan koesteren; luidkeels schreeuwen.

1. Kiel lernolibro ĉi tiu libro estas uzebla; kiel legolibro ĝi ne plaĉas al mi (kiel legolibron mi ne ŝatas ĝin).

2. La malsanulo sentis sin baldaŭ multe pli bona kaj post kelke da semajnoj la kuracisto juĝis lin tute resaniginta.

3. Estas ĝojiga fakto, ke Esperanto pli kaj pli disvastiĝas tra la tuta mondo.

4. Mi enuus, se mi la tutan tagon havus nenion por fari. Daŭra nenifardado enuigas.

5. Pro la malbona vetero la vojaĝo estas prokrastita ĝis la sekvonta semajno. Ni esperu, ke tiam ĝi povos okazi.

6. Ne ĉiaj fruktoj estas manĝeblaj, tial (pro tio) estas konsilinde, ne manĝi fruktojn, kiujn oni ne konas.

7. Pro la daŭra kreskado de la trafiko oni en grandaj urboj ofte devas malpli mallargigi tro mallargajn stratojn.

8. Estis nepre necese, ke li senprokraste forlasu la landon.

9. Kvankam mia frato skribis, ke li venos je la deka (horo), li ankoraŭ ne alvenis je la tria.

10. La serĝento ordonis al la soldatoj purigi siajn pafilojn.

lingvo.

La adjektiva formo nura lastatempe fariĝis „laŭmoda“ traduko de *enig(e)*, ekz. *Esperanto estas la nura solvo de la problemoj pri lingvo internacia*, kvankam ĝi tiun signifon ofte ne havas, sed egalvaloras la nederlandan *enkel(e)*, *alleen al*, ekz. la nura fakto (het enkele feit) *ke li diris tion, sufiĉas por nomi lin mensogulo; la nura blekado de la besto* (alleen al het brullen van het dier) *timigis lin*. Oni do prefere diru: *Esperanto estas la sola solvo de la problemoj pri lingvo internacia*.

Maak op een regenachtige vacantedag een opstel in Esperanto van min. 500 en max. 1000 woorden over „Nederlanda (Flandra) Esperantisto“. Inzendingen, ook van de Vlamingen, aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam, vóór 20 Aug. a.s. Als prijs voor de beste inzending stellen we beschikbaar: „La mondo ne havas atendejon“.

Vertaal:

La lingvo estas socia fenomeno kaj ne ia „natura“ aŭ „biologia“ aperaĵo. Tio signifas, ke ĝi povis ekesti, ke ĝi evoluis kaj evoluas ekskluzive en la kadro de la homa socio. La lingvo do estas regata de sociologiaj kaj ne de biologiaj leĝoj. Tio ankaŭ signifas ke la portanto de la lingvo ĉiam estis kaj estas la homgrupo. Sed ĝi tute ne signifas, ke tiu portanto estas aŭ devas esti nur la „nacio“. Ekzistas eĉ hodiaŭ personoj, kiuj sen troa pripensado kaj sen ia ajn respondecento emfazas pri la „nacia animo“ aŭ pri la „nacia spirito“ kiel pri la solaj kreo-

Wereldnieuws

In West-Duitsland zijn aan de uitgang van ruim 240 stations de adressen van Esperanto-consuls, plaatselijke afdelingen van de Duitse Esperanto-Bond, etc. vermeld.

Voor het deze zomer te München te houden Internationale Esperanto-Congres hebben zich reeds meer dan 1700 deelnemers aangemeld.

In Brazilië is een wetsontwerp ingediend betreffende het gebruik van Esperanto voor internationaal verkeer. Indien dit ontwerp wet wordt, zal Brazilië er bij alle landen waarmee het diplomatieke betrekkingen onderhoudt op aandringen, Esperanto te gebruiken als neutrale taal voor internationale betrekkingen.

Het gemeentebestuur van Hannover heeft besloten aan een nieuwe straat de naam Esperantostrasse te geven. Een Zamenhofstraat bestaat in Duitsland reeds in 8 verschillende plaatsen.

De zomercursussen van F.L.E. en L.E.E.N., die in Soesterberg gegeven zullen worden, beloven een succes te worden. Reeds heeft een 80-tal deelnemers zich hiervoor opgegeven.

Van „Vocabulaire Electrotechnique International“, samengesteld door de Internationale Commissie voor Electrotechniek is eind 1950 een herdruk verschenen. Dit uitgebreide vakwoordenboek geeft definities van plm. 2000 termen in het Engels en Frans en bovendien vertalingen in het Duits, Spaans, Italiaans en Esperanto.

De directie van de Yxhultz Stenhuggeri A.B., een belangrijke steenindustrie in Zweden, besloot jaarlijks 500 kronen te schenken aan een employé van elk van haar vijf ondernemingen voor het bezoeken van het Internationaal Esperanto-Congres.

Het Oostenrijkse ministerie van onderwijs heeft een subsidie van 1000 shilling toegekend aan de bij de Oostenrijkse Esperantisten-Federatie aangesloten afdeling van onderwijzers-esperantisten.

Evenals in Hamburg wordt nu ook in Keulen een speciale cursus Esperanto gegeven aan politie-beambten.

De Deense padvindingsorganisaties hebben een propagandablaadje met de portretten van Baden Powell en dr Zamenhof uitgegeven, dat aan alle leiders van de Deense padvindingsbeweging is toegezonden.

(daŭrigo de la artikolo de L. de Beaufront en la 4-a kolono de paĝo 1-a).

povus fariĝi? Sed pro tio ke ĝi estas markita per la stampilo de la logiko kaj de la klareco, ĝia karaktero literatura estas nek malpli reala, nek malpli bona. Eĉ eble ĝi aperos pli granda al atenta rigardado.

Sed, oni diros al ni, kial do insisti tiel longe pri tiu ĉi flanko literatura de Esperanto, kvazaŭ la lingvo internacia havus speciale la programon kaj la rolon superi en ĝi. Tia ne estas la penso, kiu inspiras nin. Volonte ni konsentas ke antaŭ ol celi la altan regionon de la literaturo, la lingvo internacia devas kontentigi la postulojn de la ĉiutaga vivo, de la komerco kaj de la scienco. Sed, ni rimarkigos, ke tiujn postulojn ĝi povas kontentigi nur se ĝi posedas la riĉecon, la precizecon kaj la flekseblecon necesajn por la bona esprimado de niaj ideoj en tiu ĉi triobla regiono. Sed, por tio, kiel ni jam diris ĝi devas esti kapabla fari ion pli altan, kaj sekve egali almenaŭ niajn lingvojn en la kampo literatura.

Aliparte, ĉu oni konas la rimedon trakti bone sciencon temon, demandon moralan, ekonomian, instruon, k.t.p. eĉ rakonti fakton aŭ nur skribi leteron iom seriozan, ne farante iom da literaturo? Ni estis do pravaj, kiam ni diris, ke la lingvo internacia taŭgas por nenio, se ĝi ne taŭgas por ĉio; kaj nun miaj amikoj komprenos kial ni entreprenis elmontri, kun la apogo de l'faktoj, la karakteron literaturan de Esperanto.

(Eltirita el „l' Esperantiste“, represita en „Esperantaj prozaĵoj“ — „Fabloj, Noveloj kaj Skizoj“ 3e édition-Hachette-1907).

fortoj de la lingvo. El tio ofte ili konkludas, ke la Internacia Lingvo estas nebla, ĉar ja ne ekzistas la internacia nacio“ kun „internacia animo“.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 Aug. aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel; van Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
Boekendienst, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermeuwstr. 29, Badhoevedorp Cefdel. U.E.A.: P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

La ĉefestraro deziras agrablan liber-tempon kaj belan veteron al ĉiuj ge-anoj kaj abonantoj. La sekcijaj kasistoj ne forgesu plenumi sian laŭregulan devon antaŭ ol ferii, nome ĝiri la kotizon por la dua duonjaro 1951 en poŝtkonton 34563 de Ned. Esperantisten-Vereniging L.E.E.N., Amsterdam.

Kun bedaŭro ni komunikas la subitan morton de s-ro mag. J. A. G. M. Hellenberg Hubar, urbestro de Hilversum, kiu nome de la komunumestraro gastame akceptis nian kongreson kaj okaze de la akcepto faris paroladon, kiu vekis ĉies simpation. Nome de la ĉefestraro f-ino S. Visser kondolencis la skabenaron.

Devkonscia L.E.E.N.-anaro,
Senhezite al posteno!
Ŝparu en la nuna jaro
Por kongres' en Antverpeno!

RAPORTO PRI LA JARKUNVENO

(fino)

Elektio de ĉefestraranoj: Ĉar neniu proponis aliajn kandidatojn, s-roj W. Böttcher kaj A. J. Kalma estas reelektataj.

La kaskontrola komisiono konsistis el s-ro P. v. Geel, kalkulkonsilisto, kaj s-ro H. A. Kroonder. S-ro Blokker proponas denove nomi s-ron P. v. Geel, ĉar li estas kompetentulo pri financa kontrolo. Kiel duan personon li proponas s-inon A. A. Scholten-ten Cate. Lia propono estas akceptata.

Akceptata estas la propono, ke sekcio Utrecht nomu la kontrolantojn de la biblioteko.

Koncerne la ĉefestraran proponon okazigi la jarkunvenon 1952 en Flandrujo s-ro H. Arends (Arnhem) diras, ke laŭ la regularo la jarkunveno okazu en marto aŭ aprilo.

S-ro J. Telling ne estas kontraŭ la propono sed se eventuale la kunveno en 1952 ne povos okazi en Flandrujo, la du sekcioj en Rotterdam pretas inviti ĝin. Se la venontjara kongreso okazos en Flandrujo, li ŝatus, ke la ĉefestraro interkonsiligu kun la sekcioj en R'dam pri eventuale tia kongreso en 1953. S-ro Blokker respondas al s-ro Arends, ke la regularo ĉi rilate permesas escepton. Ni pensu „internacie”; krome ni fakte havas la moralan devon akcepti la proponon de F.L.L.E. Li esprimas sian ĝojon pri la invito kiun s-ro Telling faris en nomo de ambaŭ R'damaj sekcioj. Laŭ s-ro Arends kongreso en Flandrujo estos multekosta, ĉar la delegitoj devos elspezi multon. Lian opinion substrekas s-ro E. de Wolf (Haarlem) kvankam la invito de F.L.L.E. estas tre alloga. S-ro J. V. Holleman (Groningen) ĝojas pro la kunlaboro kun F.L.L.E. kaj subtenas la proponon. Same s-ro A. Lodema (Amsterdam), kiu rekomendas starigi ŝparkasojn por eviti la malfacilaĵojn, kaŭzotajn de la altaj elspezoj. Koncerne la altajn kostojn s-ro Blokker rimarkigas ke pro la grandaj distancoj oni en multaj landoj devas elspezi multon pli por vizito al nacia kongreso ol ni por vizito al kongreso en Flandrujo. El la membroj de F.L.L.E. proks. 20 pct. nun ĉeestas nian komunan kongreson; se sama procento el niaj anoj vizitos proksimjare kongreson en Flandrujo, la sukceso estos garantiita. S-ro Arends ankoraŭ rimarkigas, ke ekster la kongreso la flandroj havas pli da kontakto; ili krome aranĝas kelkajn ĝeneralajn kunvenojn, kaj ĉu ni ne intermiksas du aferojn: jarkunvenon kaj kongreson? Laŭ la ĉefestraro la kunveno okazu en la kadro de la kongreso; ambaŭ fakte ne estas apartigeblaj. La ĉefestrara propono okazigi la jarkunvenon en 1952 je Pentekosto en Flandrujo estas akceptata per 32 kontraŭ 3 voĉoj. S-ro Blokker ankoraŭ atentigas pri nia morala devo iel kontribui al la programo. S-ro Holleman diras, ke sekcio Groningen pretas kunlabori.

Posttagmeze sekvas diskuto pri la temo „kiel plibonigi la ĝeneralan staton de nia asocio kaj de la sekcioj kaj kiel plifirmigi la kontakton?” S-ro H. J. Blokker enkondukas la diskuton, pri-traktante la nekontentigan staton de pluraj sekcioj. Diversloke regas ekskluzivismo; la sekcioj impresas „sekte”

kaj per troa diletantismo ofte fiaskas diversaj entreprenoj. Ankaŭ d-ro I. Lapenna okaze de siaj prelegoj atentigis pri tio. Mankas ofte spertaj gvidantoj. La fortaj sekcioj helpu la malfortajn kaj ni serĉu novajn vojojn kaj eblojn, se la tradiciaj montriĝas netaŭgaj. „De Esperantist”, kiu montriĝis efika propagandilo estas uzata ankoraŭ tro malmulte. Sinsekve s-roj S. S. de Jong kaj A. J. Kalma atentigas pri la valoro de artikoloj, ne nur en la gravaj ĵurnaloj sed ankaŭ en lokaj kaj asociaj periodaĵoj. Ni bezonas por plivigli la sekcian vivon spertajn prelegantojn, sed el niaj vicaj nur kelkaj personoj disponigis sin. La prelegoj de d-ro I. Lapenna ĉefe celis konvinki ne-esperantistojn pri la utilo de la internacia lingvo. Se ĉiuj sekcioj estus komprenintaj tion, la rezultatoj estus pli bonaj. S-ro S. Pragano atentigas pri kontakto kun aliaj unuigoj i.a. kun „Nut”. S-ro D. Baart parolas pri varbado per „De Esperantist”, s-ro H. Arends pri arango de prelegvojaĝoj, s-ro C. J. Timmerman pri la interŝango de sekciaj bultenoj kaj s-ro A. J. Kalma pri propagando ĉe „Volksonderwijs”. S-ro H. J. Blokker konklude konstata, ke oni faris diversajn valorajn sugestojn. Li rekomendas, ke ĉiu sekcio nomu specialan propagandan komitaton. Se bonaj ideoj montriĝas neefektivigebaj, oni kontaktu kun la ĉefestraro; eble per komunaj fortoj ni tiam povos atingi la deziratan celon.

Sekvas la libera diskutado. S-roj W. Böttcher, P. W. Baas kaj C. B. Zondervan kaptas la okazon informi la kunvenon pri diversaj someraj arangoj. S-ro J. Rooker petas esplori la eblon eldoni propran kantarono. La ĉefestraro jam konsideris la eblon, sed nur kelkaj sekcioj montris interesigon. Pro tio la minimuma eldonkvanto certe ne estos atingata. S-ro N. Wolters: „Ĉu la rezolucio koncerne N.S.E.-anojn, kiun la jarkunveno akceptis tuj post la milito ankoraŭ validas?” S-ro H. J. Blokker respondas, ke ni ne estu tro rigidaj; en event. kazoj ĉiu sekcio mem decidu. S-ro H. Arends aplaudus aperigon de nova lernolibro por progresantoj. „Ponto al la Praktiko” jam antaŭ longe elĉerpigis. S-ro P. M. Mabesoone: „La ĉefestraro jam plurfoje esploris la eblojn, sed manko de mono provizore malhelpas efektivegon de diversaj bonaj ideoj”. S-ro F. Weeke proponas al ni ke ni petu al la komunumestraro de Hilversum nomi iun aleon „Dreves Uitterdijklaan”. S-ro J. Telling rekomendas publikigi la telefonnumerojn de la funkcioj en la koncerna adresaro. S-ro E. de Wolf denove esprimas la deziron, ke la U.E.A. kongreso en 1953 okazu en Nederlando. Dufoje sekcio Haarlem okazigis konferencon kun reprezentantoj de najbaraj sekcioj por preparoli la eblojn. Oni bezonus garantian kapitalon de gld. 2500 kaj garantian fondaĵon por kovri event. deficiton. La malfacilaĵo estas trovi spertajn kunlaborantojn, kiuj disponas pri sufiĉe da libera tempo. Nia lando grandparte plenumas la kondiĉojn, kiujn s-ro H. Jakob menciis en artikolo en „Esperanto”. Eventuale oni elektu kiel L.K.K.-anojn personojn el diversaj lokoj. Amsterdam estus la plej taŭga urbo por okazigi la kongreson, sed la tiea sekcio ne kuraĝas fari la inviton. S-ro Blokker: „La malfacilaĵoj estas multaj sed eble grandparte venkeblaj; tamen ni ne povas diskuti nun pri detaloj. Oni daŭrigu la klopodojn kaj siatempe faru konkretajn proponojn”.

S-ro H. J. Blokker fermas la kunvenon, dankante la kunvenintojn pro ilia ĉeesto kaj la fruktodona diskutado.

A. J. Kalma.

Kompilita laŭ detala raporto de f-inoj A. Middelkoop kaj E. Ploeger, kiujn ni kore dankas pro la farita laboro.

In September verschijnt:
ESPERANTO-LEERBOEKJE
voor de lagere school en voor hen, die geen ander dan lager onderwijs genoten.
Eerste deeltje - door H. A. Appel
Bergen op Zoom Prijs fl. 1.50

„Esperantista” (organo de Esp. Asocio en Ĉeĥoslov.) senpage publikigas nomojn kaj adresojn de korespondemuloj. Adreso de la red.: s-ro d-ro S. Kamaryt, Chotebor 853, (Ĉeĥoslov.).

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 342, Brussel.

Sekretario: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis.
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Louisastr. 23, Mechelen.

STOPU LA TRUON:

La ĵurnaloj kaj revuoj jam plialtigis siajn abonojn, pro la plialtigo de la paperprezoj. Ankaŭ nia budgeto endanĝerigis kaj ni bedaŭrinde... ne povas postuli suplementon al la jam pagitaj jarkotizoj. Sed, vi plene konsentos, se ni petas vian helpo al agado por tamen kovri la eventualan malprofiton. La estraro esperas ke ĉi-jare multaj duonjaraj kotizoj plenigos la kason. Tiu kotizo sumiĝas je 40 fr. (por junulo nur 25 fr.). Ni elkalkulis ke ĉiuj grandaj sekcioj devus varbi minimume 5 novajn membrojn, la malgrandaj 2, kaj la reprezentantoj 1.

Laŭ ni tio ne estas utopia, ĉar kelkaj vintro-kursoj tamen bone sukcesis kaj aliflanke eksmembroj povas esti revarbataj. Cifoj la varbado okazas sen premioj, sed, laŭ onidiroj, niaj veteranoj ne bezonas tiajn rekompencojn por aktive partopreni en la ligoagadoj.

NI GRATULAS:

Du membroj de sekcio Brugge geedzigis la 7-an de Julio: Huguette Hofman kaj André Dumarey, kasistino kaj festdirektoro. (Por la kongresanoj en Hilversum: Carla kaj s-ro Debruyne). Ni elkore gratulas kaj deziras ke la verda stelo, kiu faciligis la amon en ilia

koro, povos en ĝi daŭre okupi la antaŭan, jam tradician lokon.

NI SEMAS JAM NUN!

Ofte ni konstatas ke en lokoj kie la Ligo povus organizi kurson, ni ne disponas pri Esperanto-profesoro. Ĉiuj ligoj kiuj ŝatus doni dum la venonta vintro kurson en loko ne tro malproksima de la loĝejo, bonvolu informi la sekretarion, kaj samtempe aldoni la eventualajn kondiĉojn.

Niaj grupaj kunvenoj estos certe pli interesaj se de tempo al tempo iu neloka Esperantisto venos por paroladi. Tial ni insiste petas, ke ĉiuj kapablaj ligoj, kiuj ŝatus paroladi pri *iu ajn* temo, en iu sekcio aŭ grupo de nia ligo, en la venonta vintro, komuniku al ni la kondiĉojn, la temon kaj la daŭron.

SANGO EN LA ORGANIZA REGULARO.

En la ĝenerala jarkunveno en Hilversum, la teksto de art. 7 de la O.R. estis anstataŭigata per la jena:

„De Bond heeft in één localiteit principieel slechts één afdeling. Indien echter meer dan één afdeling gewenst is, kan er door het bondsbestuur een nieuwe aanvaard worden. De mening van de reeds bestaande zal gevraagd worden”.

PLAATSELIJK NIEUWS

V.E.B. Afdeling Brussel: Op 10/5 werd er les gegeven, terwijl op 17/5 een onzer leden verhaalde over het Congres te Hilversum; op 30/5 gaf onze Voorzitter een lezing over „De Spoorweg in Finland”. Men notere dat gedurende de maanden Juli en Augustus noch lessen, noch vergaderingen doorgaan; zij blijven geschorst tot 6 September e.k.

V.E.B. Afdeling Mechelen: Ons programma Juni werd als voorzien afgewikkeld. Te beginnen met midden Juli tot begin September vinden er geen officiële vergaderingen plaats. De leden worden nochtans uitgenodigd de gewoonte der vergaderingen niet te onderbreken en zullen iederen Woensdagavond bijeenkomen, wanneer zij niet in verlof zijn, in Café Royal, Grote Markt. Weldra wordt het programma voor het aanstaande jaar uitgestippeld.

Arnhem: Dimanĉon 1/7 okazis „verda renkontigo”, kiun partoprenis ankaŭ diversaj anoj el ĉirkaŭaj lokoj. Oni ŝipveturis al Westerboewing kaj de tie promenis al Huneschans, kie parolis s-ro C. B. Zondervan kaj deklamis f-ino E. Leopold. La daŭrigo de la promenado kondukis laŭ serpentumantaj vojetoj trans la rivero Rejno tra la arbaroj al restoracio Kievitsdel, kie okazis la adiaŭo.

Den Helder: 23/7 Kunveno kun grava tagordo. Poste ferio ĝis la unua lundo en Septembro.

Groningen: La groningenanoj tre miris, kiam en la kunveno je 14/6 s-ro J. Telling el Rotterdam gratulis ilin okaze de la 25-jara ekzistado de ilia sekcio. La brava anaro mem absolute forgesis pri tio kaj la jubileo — pro kiu ni kore gratulas la groningenan sektion! — estus pasinta nerimarkate, se s-ro Telling, unu el la fondintoj de la jubileanta sekcio, ne estus atentiginta la jubileantojn pri ĝi. Fakte temas pri duobla festo, ĉar 20/6 s-ro Frieso Moolenaar, unu el la sekciaj aktivuloj, festis sian 70-an naskiĝdatrevenon. S-ro Moolenaar, famkonata komponisto de pluraj kantoj, kantatoj kaj muzikajoj por orkestro estas en niaj rondoj tre konata pro la muziko kiun li komponis por la LEEN-kanto (teksto de J. v. Schoor) kaj La Vojo (teksto de d-ro L. Zamenhof). En „Nieuwsblad v. h. Noorden” aperis detala intervjuo kun „Frieso Moolenaar, komponisto, pedagogo kaj Esperantisto” en kiu li i.a. diras, ke li kredas pri la valoro de Esperanto por pli bona komprenigo inter la popoloj kaj malkaŝas, ke li estas komponanta kantaton kun pian- kaj organakompano pri la vivo de d-ro Zamenhof. Kiam li estis 50-jara li lernis Esperanton pere de skriba kurso de la nuna ĝen. sekr. de LEEN, kiu mem, 7-jara, estis instruita de s-ro Moolenaar pri la arto pianludi. S-ro Frieso Moolenaar farigis bonega esperantisto; pri la pianistaj talentoj de la sekr. de LEEN ni diru nur ke la malsukceson certe ne kaŭzis la bonegaj pedagogiaj talentoj de lia instruinto. Al s-ro Moolenaar niajn koraĵajn gratulojn!

Hilversum: Dimanĉon 24/6 sekcio Hilversum okazigis ekskurson, kiun partoprenis ankaŭ anoj de najbaraj sekcioj, i.a. de la ĵus fondita sekcio Naarden-Bussum. En julio oni ĉiujande kunvenos je la 20.00 h. antaŭ „Ons Gebouw” por fari biciklo-ekskursojn.

La logantaro de Hilversum konsiderinde kreskis; naskiĝis Jacoba Jansje Elisabeth, filino de ges-roj Pothuizen, Maria Elisabeth Antoinette, filino de ges-roj De Klerk kaj Roelofke Maaik Benita, filino de ges-roj Koopmans. Koraĵa gratulojn al la gepatroj!

Rotterdam-Merkurio: Kunveno 18/7 je la 20.00 h. en „Ons Huis”. En aŭgusto ne okazos kunvenoj.

S-ino Clelia Conterno Guglielminetti, vic-prezidantino de Itala Esperanto Federacio kaj redaktorino de „l'Esperanto” komence de junio vizitis nian landon. Sabaton 9/6 ni renkontis ŝin en Amsterdam kaj havis la okazon interŝangi kun ŝi diversajn ideojn pri nia movado. S-ino Conterno, kiu montriĝis bonega esperantistino, samvespere prelegis en Rotterdam pri famaj italaj pentristoj kaj 10/6 en Hago pri Italujo. Al la prelegintino koran dankon pro ŝia komplezo!

La Torina sekcio de Itala Esp. Junularo aranĝos *espistan junularrenkontigon 5-26/8 apud Courmajeur. Informojn donas G.I.E., Casella Postale 127, Torino (Ital.).*

EXAMENS ESPERANTO

Amsterdam, 3 Mei 1951:

Examen B:

Aangemeld 9 kandidaten, opgekomen 7, geslaagd 4: mej. H. C. Butter te Zaandam en de heren J. D. M. Cornelissen te Amsterdam, J. J. v. Meningen te Hilversum en J. Ph. Punt te Zuilen.

Examen A:

Aangemeld 48 kandidaten, opgekomen 43, geslaagd 25: de dames E. v. d. Laarse-v. h. Hof te Aalsmeer, H. A. Postma-v. Albada te Amersfoort, F. H. M. ten Brink, H. Harman, A. Koene en G. v. Oostwaard te Amsterdam, A. H. Coymans en M. M. Lahn te Arnhem, J. v. Buitenen te Rotterdam, G. M. Buitendijk-Nieuwenhoven en P. Walst-Vrolijk te Zaandam en de heren C. W. Seigers te Amsterdam, L. de Jong te Apeldoorn, E. Hutter te Beverwijk, M. W. Thomson te Den Haag, P. Munsterman en M. D. Tierie te Haarlem, J. v. d. Oord te Halfweg, S. Gruys te Koog aan de Zaan, P. Huyzman te Krommenie, A. J. W. v. Kouwen en A. Markus te Rotterdam, F. Hoekstra te Utrecht, W. H. v. Beek te Vinkeveen en K. Schagen te Zaandam.

Leeuwarden, 3 Mei 1951:

Examen B:

Aangemeld 4 kandidaten, opgekomen 4, geslaagd 2: mej. E. Hovinga te Groningen en de heer H. J. Bachofner te Bolsward.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMIOJN post n-roj 107-108 ni ĉi-foje ne aljuĝis pro la eraro, kiu enŝovigis en n-ro 108. La nomoj de la premiitoj do aperos en la venonta numero.

SOLVOJ.

N-ro 108. aliformigi; suĉinfano; heredantino; datreveno; gardostari; facilrompa; genuosteto; glaciŝranko; aeroplano; kolhararo; duonfali; fruktodona; aerkastelo; sakfajlo; fraŭlino; furiozulo; buterpano; anonimulo; okulvitroj; kapitalisto; kargoboato; akvofalo; tibiokarno; flegistino; mangrenado; graciulino; okulfrapa; gastiganto; senlirejo; doganisto; pikildrato; artefara; grizharulo; trifolio. Inter pokalo kaj lipoj povas multe okazi.

N-ro 109. Horiz. 2. militkapit. 4. kontrastigi. 6. varmeta. 7. ek; ve. 8. fon; ulo; mir. 10. motorbicikl.

Vert. 1. ĉef. 2. ĉifon; kolon. 4. distraj; sov. 6. akra; malobe. 8. apetito; eco. 10. pingl; viski. 11. ber.

N-ro 110. Kion rajtas leono, tion ne rajtas azeno. Rostita kolombeto ne flugas al buŝeto.

N-ro 111: KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 2. parto de kapo(R); formuli(R). 3. esti peranto(R). 4. plej alta grado(R); pompa tono(R). 5. persona pronomo; adverbo por akcenti aserton. 6. konkuranto(R). 7. regnestro(R). 8. bongustigi manĝaĵon(R);

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
2	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
3	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
4	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
5	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
6	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
7	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
8	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
9	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
10	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
11	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■

LA REVENO

En iu urbo iam loĝis riĉega viro. Li posedis ĉion kion homo povas imagi kaj eĉ iom pli. Tamen li ne estis feliĉa.

Iutage, kiam la enuo incitis lin pli ol iam, venis al li la ideo fari veturekskurson. Li ĵugigis siajn blankajn ĉevalojn kaj forveturis. Rapidrote oni antaŭeniris, la tutan tagon, kaj proksimume je la vespero li enveturis la stratojn de malnova urbeto. La riĉa sinjoro vekigis kaj atente ĉirkaŭrigardis.

„Amiko,” li parolis al la veturigisto, „haltu momenton. Mi ekmemoras ion.” La riĉa sinjoro side rektigis kaj meditante observis la fasadojn de la domoj. La sonorilo ludis kaj odoro de lonicero ŝvebis el la murĉirkuŝitaj ĝardenoj. En la malproksimo bruetis la akvo de pumpilo.

„Ĉion ĉi tion,” parolis la riĉa sinjoro, dum kiam stranga sento perforte prenis lian koron. „mi pli ofte aŭdis. Jam antaŭe mi vidis tiujn fasadojn kaj mi memoras tiujn sonojn. Mi rekonas ankaŭ la odoron, venantan el la ĝardenoj. Sed kiam tio okazis?”

Li elveturigis kaj ordonis la veturigiston, reiri sola. Kaj li mem vagis tra la stratoj de la urbeto kaj ĉiam pli surprizigis. Li fine kaptite haltis antaŭ malnova domo. Serioze ĝi suprenigis, sed silente kaj ĝojigite la fenestroj brilis en la lunlumo. Kaj la riĉulo ekploris. Ĉar li rekonis la domon kie li estis loĝinta kiel infano.

Tion vidis maljuna pastro, kiu pasigis siajn lastajn vivojarojn malantaŭ fenestro de ĉi tiu loĝejo. Li estis bonkora viro kaj estis emociata. Kaj li iris eksteren, metis sian manon sur la ŝultron de la fremdulo kaj parolis: „Vi estas malĝoja. Diru al mi vian ĉagrenon, por ke mi povu helpi vin.”

„Ĝi ne estas malĝoja,” respondis la riĉulo, „sed ĝojo, ĉar mi retrovis kion mi kredis perdita: la feliĉon de miaj infanaj jaroj. Vendu la domon al mi. Mi pagos al vi ĉion kion vi postulas.”

La pastro pripensis kelkajn momentojn. Poste li ridetis kaj parolis: „Mi ankaŭ aliloke povas esti feliĉa. Ĉar la feliĉo ne troviĝas en la domo, sed en la koro. Enloĝigu en ĝin. Vi rajtas fari kun ĝi kion vi volas. Nur unu demando mi faras al vi; ke vi lasu la sentencon, kiun mi pendigis super mia lito. Ĉar tuta vivo estis necesa por kompreni la veron de ĝi.”

Tion promesis la riĉulo. Kaj li ekloĝis en la malnova domo. Kaj la unua kion li rigardis estis la sentenco super la lito. Ĉi tion li legis sur ĝi: „La feliĉo kuŝas en ni.” Legante tion li riĉulo ne povis ne rideti. Kaj li promenis en la subtegmentejo kie li ludis kiel infano kaj li malsupreniris en la kelon, kie li iam, antaŭ multaj jaroj, estis enfermita. Li vagis tra la koridoroj kie

estrado(R). 9. levigi kaj mallevigi kiel akvo(R). 10. aldoni teritorion al regiono(R); birdo(R). 11. tio, pri kio oni parolas(R).

Vertikale. 1. laŭte aprobi(R); sukcese forkuri(R). 2. enigi pinton(R). 3. ludkarto(R); laborejo de ne-metistoj(R). 5. grava persono sur ŝipo(R); parto de korpo(R). 6. nacio, konsiderata en siaj rilatoj kun fremdaj landoj(R). 7. domparto(R); ludkarto(R). 9. doni bonan ekzemplon(R); amerikanon(R). 10. akragusta vegetaĵo(R). 11. danĝerplena; fumita cigaro(R).

N-ro 112: ANSTATAŬIGU

unu literon en ĉiu el la subaj vortoj, por formi novajn vortojn laŭ la aldonaĵaj signifoj. La anstataŭigitaj literoj, legataj en la sama sinsekvo, fariĝos proverbo.

Vortoj: 1. viando; 2. dirata; 3. nivelo; 4. krusto; 5. salivo; 6. betono; 7. kapon; 8. limako; 9. galero; 10. klingo; 11. valoro; 12. betulo; 13. tabelo; 14. klaŭno; 15. sopiro; 16. kateto; 17. rafano; 18. sperto; 19. kimono; 20. tondro; 21. aperti; 22. kulero; 23. starti; 24. batalo; 25. kverko; 26. alkovo.

Signifoj. 1. ĝi produktas elektron; 2. fortege impresanta; 3. publikigi; 4. ĉeso de laboro; 5. kofreto; 6. homo kiu honora titolo; 7. apogseĝo; 8. arbo; 9. ĝi gvidas ĉe la uzado de la lingvo; 10. senvalorigo; 11. konkuranto; 12. la jaraĵoj en- kaj elspezoj; 13. paperfolio; 14. ĉambroparto; 15. kvanto da manĝaĵo; 16. devenanta el malproksima lando; 17. muelaĵo; 18. birdo; 19. parto de jako; 20. antaŭa parto; 21. spirite vigla; 22. dolĉaĵo; 23. metode klarigi temon; 24. listo; 25. elkreskaĵo de la haŭto; 26. senrajta homo.

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z., kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel, antaŭ la 15-VIII-51.



D-ro Ivo Lapenna: Retoriko, kun aparta konsidero al Esperanta parolado, eld. de la aŭtoro, Parizo 1950, 215 p.

La verko enhavas en unua parto elementajn sciigojn pri la lingvo (eksto, influantaj faktoroj, formigoj de grandaj komunaj lingvoj kaj, fine, ĉapitro pri „Lingvo kaj Penso”. En dua parto estas pritraktata la Retoriko (elokventeco kaj retoriko, fizikaj ecoj de la oratoro, intelektaj ecoj liaj, moralaj ecoj, la publiko, la parolado kaj konkludo). En aldono aperas kelkaj modelaj paroladoj (tiu de Brutus kaj de Antonio, ambaŭ laŭ tekstoj de Shakespeare, tiu de d-ro Zamenhof en St Peterburg 1910, kaj fine tiu de la aŭtoro mem en Parizo 1950, okaze de la malferma kunsido de la 35-a U.K. en Sorbono).

Kvankam la titolo iom erarigas, ĉar temas pli pri „Retoriko” kaj malpli pri „Konsidero al E-a parolado”, la libro estas tre bona, ne nur pro la enhavo, sed ankaŭ pro la lingvo — originala — kaj la stilo, bone konataj de tiuj, kiuj jam aŭdis d-ron I. Lapenna.

Antaŭparolo de R. Rossetti neniel malpliigas la valoron de la enhavo kaj krome prezentas al ni alian modelon de la internacia lingvo.

La ekstera aspekto estas tiu, kiun ni jam spertis koncerne la francajn eldonojn: la preso perfekta, sen eraroj, sed la papero ne tre bona kaj la kovraĵo sama.

Kvankam aspiranto-retoro sendube trovas en sia nacia lingvo almenaŭ same taŭgan eldonon koncerne retorikon, ni nepre volas rekomendi ĉi tiun libron, ĉar ĝi enhavas interesegajn sciigojn kaj konsilojn, kvankam oni prave bedaŭras ke la pritrakto ne estas pli specife adaptita al Esperanto mem.

T.V.G.

Germanlingva prospekto pri Bamberg, kun aldona folieto Esperantlingva, senpage havebla ĉe Städt. Verkehrsamt, Maxpl. Bamberg (Germ.).

Ilustrita prospekto pri Konstanz (kun aparta 4-paĝa folieto en Esperanto), eld. Städt. Verkehrsamt, Konstanz.

Al la ilustrita gvidfolio pri „Lago de Como” (jam menciita en la antaŭa numero) estas aldona 16-paĝa broŝuro pri la tieaj restadlokoj. Ni ricevis kvanteton kaj la red. volonte sendos senpage ekzempleron al ĉiu petanto.

plej grandajn ŝtonetojn kiuj estis akireblaj. Nun la maljuna pastro ne plu povis rigardi trans la barilon por informiĝi kiel fartas la sinjoro kaj tial li eniris tra la perdeto.

„Kiel vi fartas?” li demandis, „ĉu ĉio estas laŭ via deziro?”

„Sufiĉe bone,” respondis la riĉulo, levante ŝtoneton, „sed tamen ne estas kiel antaŭe. La servisto kaj la servistino estas ĝintaj tro malgrandaj. Antaŭe mi atingis nur ilian talion. Kaj nun ili devas levi unu la alian por atingi la anson de la ĉambropordo. Antaŭe ĉi tio estis alia. Tio ĝenas min.”

„Tio estas rebonigebla,” opiniis la maljuna pastro, „troviĝas kuriozaĵbudo, ne malproksime de ĉi tiu urbo, kie oni povas rigardi du grandegulojn, viron kaj virinon. Ĉu mi venigu ilin? Vi ja estas sufiĉe riĉa.”

„Diru, al ili tuj veni ĉi tien,” parolis la riĉulo, „ĉar tio estas la sola kio mankas al mi.”

Kaj la du grandeguloj venis. Ili estis viro kaj virino kaj ili superis lin per kapo kaj ŝultroj. Kaj ili helpis lin kiam li transpaŝis la sojlon kaj levis lin en lian seĝon kiam li deziris sidi. Kaj jam la duan tagon post ilia alveno li enuis. Sed la maljuna pastro ne plu preterpasis por informiĝi kiel li fartas.

Tiam li mem iris al li kaj trovis lin leganta en la biblio.

„Kion vi legas?” demandis la riĉulo. „Mi legas,” respondis la maljuna pastro, metante sian brunan montran fingron sur la paĝon, „se vi ne fariĝos kiel infanoj, vi neniel eniros en la regionon de la ĉielo.”

„Tamen,” amare parolis la grizharulo, „mi faris ĉion por akiri la ĉielon.”

„Vi faris nenion,” respondis la maljunulo, „vi nur pligrandigis vian ĉirkaŭaĵon. Sed vi mem devas fariĝi malgranda. La feliĉo ne estas ekster ni. Ĝi kuŝas ĉi tie, en vi. Mi jam skribis ĉi tion super via lito. Kaj mi dezirus ke mi poste, laŭvere, povus skribi tion super via tombo.”

El „FABELOJ” de Godfried Bomans trad. J. Rooker.

Manuskriptoj por la venonta numero atingi la redaktoron antaŭ la 14-a de aŭgusto.

M. Dekker: La mondo ne havas atendejon, teatraĵo en tri aktoj, el la nederlanda de F. Faulhaber; eld. S.A.T. Parizo, 1951, 80 p. Prezo: 0,70 dol.

Tiu eldono estas financita kaj prizorgita de la Asocio de Laboristaj Esperantistoj en Nederlando okaze de ĝia 40-jara jubileo en 1951. La aspekto, la papero kaj la preso de la libro estas bonaj kaj la teatraĵo prezentas al ni temon streĉan kaj aktualegan. Notu ke, kvankam freŝdata, la verko estas jam tradukita en la sveda, dana kaj hebrea kaj prezentita en la diritaj landoj, krom en Nederlando, kun granda sukceso. Kaj la aŭtoro bonvole donis la traduk- kaj prezentpermesojn por la internacia lingvo, eĉ verkante specialan antaŭparolon por la Esperanta eldono.

En tri aktoj, la aŭtoro montras al ni la akran konflikton, ekestantan okaze de la eltrovo kaj provado de la „piradumio” (multe pli potenca detruilo ol la atombombo) inter la inventinto, prof. Ch. Thomson kun lia filo kaj la reprezentanto de la ŝtato, generalo Greenway; ĉi tiu rekonas nur la interesojn de la ŝtato kiam la filo — kaj finfine ankaŭ la patro — akceptas ke „la mondo ankoraŭ ne estas preta kaj la homaro ne estas matura por posedi fortojn, por kies regado oni devus esti ne homo, sed estulo de pli granda perfekteco, iu Dio...” kaj disŝiras la raporton, kiu enhavas la sekreton.

La verko estas sendube tendenca, sed kiu pensanta homo ne komprenas tiun tenigon?

Ĝi cetere estas instrua, streĉa kaj drama, tiel ke ni legis ĝin „unuspire”.

Kvankam la teksto impresas iom tro „traduka”, ĝi estas bonega, cetere kontrolita de la „Literatura Komitato”. Ni notis maloftajn pres-erarojn (antaŭus = anstataŭus; ligloj = ligiloj) kaj krajone substrekis ne tre multajn punktojn: privilegio (privilegio); manki je (de); ĝis kiam (ĝis); daŭrigi (en diversaj sencoj; plu vivi ktp); tien kaj reen (ree). En la fino de la libro, listo de la „neologismoj” (maloftaj) kaj de la fremdlingvaj vortoj kompletigas la tuton.

La verko meritas pro la ekstero kaj ĉefe pro la enhavo lokon en ĉies biblioteko kaj... oftan relegon. Kaj mediton!

T.V.G.

EXAMENS ESPERANTO

Leeuwarden, 3 Mei 1951:

Examen A:

Aangemeld 16 kandidaten, opgekomen 15, geslaagd 12: de dames M. Slink te Groningen, G. Braaksma-de Vos en M. Kuyt-Prakken te Heerenveen, T. H. K. Staal-Dijk te Hoogezand, J. Broekens en T. Wijnstra te Leeuwarden, B. F. Kliphuis te Sappemeer en A. Rozema te St. Jacobi-Parochi en de heren J. S. Boersma te Groningen, J. L. Middel te Hoogezand, R. de Haan te Leeuwarden en H. Zuiderveld te Nuis.

Den Haag, 16 Juni 1951:

Examen B:

Aangemeld 2 kandidaten, opgekomen 2, geslaagd 1: mej. M. L. A. Nederkoorn te Doetinchem.

Examen A:

Aangemeld 35 kandidaten, opgekomen 34, geslaagd 21: de dames A. M. Beyer en G. v. Steenbergen-v. Amerongen te Den Haag, A. Verijzer en M. P. Weber-v. Wezel te Middelburg, W. v. Baalen en H. Kieft te Rotterdam, E. Rozie-Heeck te Velp, T. Kalkman-Moerman en E. Kervers-v. Tholen te Vlaardingen, Th. A. M. Timmermans te Voorburg, M. Kooiman te Zaandam en de heren F. J. v. Mer-venne te Den Haag, J. Melger, M. W. Ritmeester en F. H. Ströning te Dordrecht, E. Ch. A. Runge te Gouda, W. L. v. Leeuwen te Utrecht, H. Kervers en L. Lakerveld te Vlaardingen, W. de Graaf en C. L. V. Zwan te Zaandam.

Alkmaar, 16 Juni 1951:

Examen A:

Aangemeld 15 kandidaten, opgekomen 15, geslaagd 9: de heren J. N. Blom, S. Blom en J. M. R. Ruijgers te Alkmaar, J. W. Beers te Heer-Hugowaard, J. N. Bolten te Heilo, P. O. Genée te Koedijk, J. I. M. Mok te Limmen, G. H. Kos te Noord-Scharwoude en D. Groen te Schoorl.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.).